Aparta ĉapitro estas rezervita al la ciklo-oktatetraeno kaj al la aliaj „ciklopolienoj" sintezitaj de Reppe, elire de acetileno sub premo.

Pluraj centoj da bibliografiaj indikoj, paĝmalsupre aldonitaj, kompletigas la riĉan enhavon de ĉi tiu libro, kiu estas unuaranga referenca verko, nepre rekomendinda al fakuloj.

La mondlingvanon aparte interesos la antaŭparolo, en kiu la tradukintoj (per la plumo de profesoro Alfred Gillet, de la universitato de Liège) substrekas „la grandajn malfacilaĵojn rilate al la tradukado de ĉi tiu tre specialfaka scienca verkaĵo, precipe pro la origine anglolingva fakterminaro en kiu ,svarmegas neologismoj". Tiu konfeso akre prilumas la gravan laboron de ni farotan en ĉiuj branĉoj de la sciencoj kaj teknikoj. La vojon irotan klare jam montris nia elstare kompetenta aŭstria samideano D-ro Inĝ-ro Eugen Wüster en sia germanlingva ĉefverkaĵo *„Internationale Sprachnormung in der Technik"* (Internacia lingvonormigo teknika) eldonita en 1931 de VDI-Verlag en Berlin NW7.

A. LIENHARDT (Mulhouse).

378.183.4 = 089.2 (489) : 378.18.067.1 „1952"

## DANA ŜTATO DENOVE MALAVARE SUBVENCIAS ARKEOLOGIAN TENDARON KAJ STUDRESTADON EN DANLANDO POR ESPERANTISTAJ STUDENTOJ KAJ ALTLERNEJANOJ.

Same kiel en du antaŭaj jaroj okazos denove internacia arkeologia tendaro por esperantistaj studentoj kaj altlernejanoj somere 1952.

La aranĝo komenciĝos en Kopenhago la 5-an de julio, kaj dum du tagoj la partoprenantoj vizitos vidindaĵojn de Kopenhago, poste oni iros al Nord-jutlando kie la partoprenantoj partoprenos la elfosadon de vikinga fortikaĵo Aggersborg. Jam antaŭ du jaroj esperantistaj studentoj elfosis tie. Dum la elfosado la partoprenantoj loĝos en hotelo kaj manĝos en privata pensiono. La 23-an de julio oni vojaĝos al internacia studenta centro en la bienego Hald apud urbo Viborg. Kaj tie la partoprenantoj restos ĝis la 26-a de julio.

Pro ŝtata subvencio la partoprenantoj pagu nur 110 danajn kronojn por la trisemajna restado, kaj en tiu prezo estas enkalkulitaj: restadoj (manĝo, loĝo kaj ekskursoj) en Kopenhago, Aggersborg kaj Hald. Krome ankaŭ vojaĝo de Kopenhago al Aggersborg, kaj de Aggersborg al Viborg. Dum la elfosado la partoprenantoj ricevos 1 danan kronon po labortago.

Pasintan jaron multaj vane aliĝis, tial la aranĝanta organizaĵo petas ke ĉiuj interesatoj tuj aliĝu.

Petu senpagan programon de DANA INTERNACIA STUDENTKOMITATO, La universitato, Sct. Pederstraede 19, Kopenhago K. Danlando.